# *Sesias en Havano kunsido por starigi strategion regionan kontra? ebolo.*




Kiel estis anoncite en la fina deklaro de la pintkunsido de ALBA-TCP kontra? ebolo, okazinta en Havano, eksesiis en tiu ?i urbo, la teknika kunsido de fakuloj kaj estraranoj por inter?an?i spertojn kaj konojn, kaj interkonsenti strategiojn preventajn por alfronti la viruson de ebolo.

Dedi?ante minuton de silento por la kuba kunlaboranto Jorge Juan Guerra Rodríguez, forpasinta en Gvineo Konakry, eksesiis la kunsido en la Kongresa Palaco de Havano.

La kunsidon partoprenas reprezentantoj de ALBA, la bolivara alianco por la popoloj amerikaj, CELAC, la komunumo de latinamerikaj kaj karibiaj ?tatoj, la OPS, tutamerika organizo pri sano, kaj entute ari?as reprezentantoj de 30 landoj kun la celo koncentrigi strebojn por haltigi tiun malsanon kiu konta?is pli ol 10 141 personoj en ok landoj kaj mortigis almena? 4 922 personoj la? raportoj de la monda organizo pri sano (OMS).

?iu lando prezentas siajn planojn por atingi la celon, kaj poste laboros en komisionoj kiuj traktos aparte la diagnozon, traktadon kaj gvadaton epidemiologian; klinikan mastrumadon de pacientoj; formadon kaj kapabligon kaj socian komunikadon. Temas pri kvar laborteamoj kiuj prezentos finan dokumenton kiel

regionan proponon.

La iniciato de ALBA en la batalo kontra? ebolo sukcesis alproksimigi internaciajn organizojn kaj volojn naciajn en etoso kunlabora por alfronti kaj preventi la malsanon kune kun diversaj landon por impulsi programojn rilatajn al kontribuebloj por haltigi la ekspansiadon de la viruso.

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/37863-sesias-en-havano-kunsido-por-starigi-strategion-regionan-kontrau-ebolo

**Radio Habana Cuba**